

STILLO
RUBRO

R. ROSETTI

SPEGLIO
DE
ESPERANTO
STILO

La artikoloj estas, kun permeso, transpresitaj el diversaj numeroj de „Heroldo de Esperanto“. Pro financaj kialoj la tipografio de la artikoloj ne povis esti unuecigita.

Reto Rossetti: Spegulo de esperantaj stiloj.

ISBN 90 70074 11 7

© 1976 Vulpo-Libro/W.F. Pilger.

La artikoloj pli frue aperis en 'Heroldo de Esperanto', Bruselo.

Mendebla ĉe la eldonado per transpago al nederlanda poŝtgiro 1505865 / per internacia poŝtmandato / per alsendo de poŝtaj respondkuponoj / *ne* per banko.

Prezo inkluzivanta sendkoston: 1 aŭ 2 ekz. po 2,25 gld. (3 rpk); 3–9 ekz. po 1,90 gld. (2½ rpk); 10 ekz. kaj pli po 1,15 gld. (1½ rpk).

Vulpo-Libro, Leekerhoek 26. Lelystad, NL-7148, Nederlando.

Spegulo de esperantaj stiloj

Reto Rossetti

La stilo estas la homo mem, oni diras

Vere, ke en la unua periodo de nia lingvo oni imitis la stilon de Zamenhof. Tio estis necesa, ĉar ĉiu stilo devas eliri el komuna bazo. Sed jam tiam la stiloj de Zamenhof kaj Kabe diverĝis: tiu de Zamenhof pli plena, tiu de Kabe pli svelta. Kaj ankoraŭ dum la vivo de Zamenhof la stilo de Privat estis tre alia ol la zamenhofa.

Kiam la eŭropa milito fermis tiun periodon kaj mortis la Majstro, la baza stilo estis larĝe establita tiel, ke ĝin sorbis eĉ tiuj, kiuj ne konis senpere la verkojn de Zamenhof. Tia estis ekzemple Lanti, kies propra stilo estis plene evoluinta antaŭ ol li turnis atenton al la zamenhofaj tekstoj. La stiloj kreskis el du parencaj fontoj. Tiu de Jean Forge pli similas la koncizan klarecon de Kabe, dum tiu de Baghy sidas rekte en la zamenhofa tradicio, sed kun propra tono.

Kiel diversaj stiloj havas apartajn tembrojn, tiel ili ankaŭ havas apartajn ritmojn kaj aromojn.

Sian stilon oni ordinare fondas frue kaj poste disvolvas, farante ĝin pli matura, pli trafa. Ĉe tio oni kolektas dise, kvazaŭ pigo: de tiu aŭtoro, lertan esprimon; de alia, novan aplikon de vortsenco, kaj de tria spritan parolturnon aŭ unu vorton, kie oni mem diradis du. Kaj kompreneble oni mem kreas kaj iniciatas.

Kio plu? Ĉion, kion vi skribas, provu per voĉo kaj orelo. Ĉe tio vi eble aŭdos:

1. Sinsekvon de sama vokalo, ekzemple: „Riproĉu la infanon *prefere ne tre severe*” (8-foje *e*, kun ankaŭ kornika rimo), aŭ „*ŝi ektimis ĝis rigidigo*” (6x *i*). Kaj se vi ŝanĝas la duan al „*ŝi terurigiĝis ĝis plena paniko*”, tiam demandu vin, ĉu tiu „*iĝis ĝis*” vere lulas vian oreleon. Se ne, diru „en”.

Kompreneble la plej ĝena vokalo ĉirilate estas tiu *i*, la plej malvasta el la kvin. Ĉe *a*, la plej vasta, ripeto apenaŭ gravas kaj sendomaĝe oni diras *banala kanzono* aŭ (Kalocsay) *hamstra akaparo*.

2. Atentu same pri tuberoj de konsonantoj, ekz. *groteska kontrasto* (en ambaŭ vortoj *tr sk*). Diru *prefere kontrasto kurioza*, skua, originala aŭ bizara. Kaj evitu vicon da siblaj sonoj: ŝiaj nervoj jam *sufiĉe streĉiĝis*. Diru *prefere*: tio jam forte streĉis

ŝiajn nervojn, aŭ: ŝi jam travivis akutan nervostreĉon. — Sed finfine juĝu la orelo, ne la aritmetiko.

Konsonantripeto povas esti bela: *Vibras vok’ en vaga vento*, aŭ: *sur la brue bata brusto de l’ aer’*. — Aliflanke oni povas ekspluati ĝin por burleska efekto, kiel faras Baghy en *Praktika instrumentodo*, kiam la entuziasma Mihok proklamas:

„*Tiu ĉi prototipa protokolo helpas min kaj ankaŭ vin en la alproprigo de mia propra, propaganda, praktika paroliga metodo. (Ho, kiel bela estas nia lingvo!)*”

3. Iom da varia vortlongo helpas la komprenon. Atentu precipe pri vico da kvarsilaboj: liaj *elokventaj paroladoj eminente kontribuis* al la venko. — Por „*elokventaj*” diru laŭplaĉe *vervaj, flujaj, sorĉaj*, kaj anstataŭ „*eminente*” vi povas diri „*alte*” aŭ simile. Tio ankaŭ variigas la ritmon.

Tiaj kosmetikaj ŝanĝoj ekzercas la guston kaj edukas la oreleon. Se vi ne amas tiel esplori kaj frizi viajn frazojn, nu ĝoju, ĉar finfine estas nebone, se la stilo tro okupas la spiriton. Jen mi prezentas sortimenton da tekstoj kaj mi esperas, ke tie vi trovos la kolorojn de diversaj personecoj, dum vi ĝue tralegas ilin.

1. L. Zamenhof

Zamenhof naskis la lingvon kaj samtempe ĝian originalan stilon, de kiu absolute dependis ĝia stilo traduka. La lingvo do havis dekomence ne nur formon sed ankaŭ apartan, tute propran voĉon. Eble ĉefa trajto de la zamenhova stilo estas ĝia serena, ĉiufanka esprimpovo: Zamenhof

simple ne kapablis skribi ion, kio estus malklara aŭ konfuza. Ni rigardu, kiel en 1893 la ses jarojn aĝa lingvo povis jam esprimi indignon kaj, pli mirinde, eĉ la ironion, kiu devas ja tiel efiki, ke oni diras ion kaj komprenigas la malon.

Pseŭdo-esperantistoj

De tempo al tempo ni ricevas de diversaj flankoj leterojn pli-malpli en la maniero de la sekvanta letero de s-ro X., kiu kuŝas nun antaŭ niaj okuloj:

„Jam longe mi ne skribis al vi, kaj vi kredeble jam pensas, ke mi, iam varma amiko de la lingvo Esperanto, nun jam forĝesis pri ĝi. Se vi tiel kredas, vi eraras. Mi ĉiam restos varmega amiko de Esperanto kaj mi neniam ĝin forĝesos. Sed kiam mi komencis siatempe labori por Esperanto, mi renkontis tiom da malfacilaĵoj, ke mi vole-ne-vole devis lasi fali la manojn, kaj venis al la konvinko, ke nun la mondo ne estas ankoraŭ matura por tiu granda ideo. Sed estu tute certa, ke kiam nur la cirkonstancoj ŝanĝiĝos kaj la surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos, vi tuj vidos min en la vicoj de la plej energiaj batalantoj. Skribu al mi, kion nia afero faris de la tempo, kiam mi ĉesis esti aktiva esperantisto; kiom da amikoj la afero nun havas? kiaj novaj verkoj eliris? Se la „Esperantisto” ankoraŭ eliras, sendu al mi ian numeron de ĝi.

Entute estus bone, se vi de tempo al tempo sendus al mi ian novaĵon pri Esperanto, por ke mi ne tute forĝesu pri ĝi... ktp., ktp.”

Ne vere, amikoj, kia edifa kaj grandanima maniero de pensado? Kiam dank' al niaj senlacaĵoj, paciencaĵoj kaj malfacilaj laboroj nia ideo fine venkos, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj, post la eternaj ĉagrenoj, malagrablaĵoj kaj mokoĵoj, levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, tiam sinjoro X. tuj aliĝos al ni kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj kunbatalantoj! Dume „la mondo ne estas ankoraŭ matura”, kaj tial s-ro X. en tia grado ne povas esti „aktiva esperantisto”, ke li ne povas eĉ... por sia propra persono aboni la „Esperantiston”, kiu „havas por li ĉiam

grandan indon”, kaj sian aldonitecon al nia afero li esprimas per tio, ke li petas nin; havantajn tro multe da libera tempo, skribadi al li de tempo al tempo pri la stato de nia afero.

Ne, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkas. Sed kiam dank' al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti „fantazio, pri kiu la bona tono postulas, ke oni ĝin moku, ne esploriginte ĝin”, kiam Esperanto estos ĉie akceptita kaj sankciita, — tiam ni vin ne bezonos, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj.

Vi faris malgrandan proveton de laborado, kaj kiam ĝi restis sen deca sukceso, vi tuj ĉesis! Sed se nia laborado apartenus al tiuj dankoportaj aferoj, kiuj estas kronotaj de tuja granda sukceso, tiam ni ja facile trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonus! Vi ĉiuj (via nombro estas jam tre granda), kiuj staras nun kaŝite kaj atendas, — ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn. Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi *nun*, kiam ĝi bezonas laborantojn; batalu por ĝi *nun*, kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan bataladon; staru forte kaj nekaŝite, kiel granito inter ondoj *nun*, kiam la malfavoraj cirkonstancoj tion ĉi postulas; oferradu malavare *nun*, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon: „esti aŭ ne esti”.

Ĉia nova ideo devis batali longe kaj malfacile, kaj vi, sinjoroj X. kaj similaj, kiuj ĝuas nun la dolĉajn fruktojn de tiuj ideoj, vi eble ne havas eĉ supozeton pri la maldolĉa ŝvito, kun kiu oni siatempe semis tiujn ideojn. Ni, veraj amikoj de lingvo tutmonda, scias tion ĉi tre bone, kaj ni la-

boras pacience, pacience, pacience, kaj nek la tuta terura surdeco, kiu regas ĉirkaŭ ni, nek la malkuraĝigaj, malesperigaj batoj de la sorto, kiujn ni renkontas sur ĉiu paŝo, forpelos nin de nia vojo. Armitaj per tiu ĉi fera pacienco kaj per la konscio de la vereco de nia ideo, ni iras antaŭen malgraŭ la malhelpoj, kiuj baras ĉiun nian paŝon, kaj ni ne dubas, ke pli aŭ malpli frue ni venkos. Sed vi, sinjoro X. kaj miloj da similaj personoj, kiuj preferas atendi ĝis la ideo nun mokata kaj persekutata fariĝos ideo moda, atendu trankvile, — sed ne nomu vin esperantistoj. Ni batas nun la dikegan muron, kiu staras inter la popoloj; cent batoj restas sen rezultato, sed ni ne

perdas la paciencon kaj estas kontentaj, kiam la centunua elrompas unu brikon. Enua estas tiu ĉi malrapida laborado, sed ni ĝin ne ĵetos. Kaj kiam la milionoj da internaj fendoj, kaŭzitaj de niaj paciencaj batoj kaj ĝis nun tute kaŝitaj, subite ek-efikos, kiam la murego, subrompita en diversaj lokoj, en unu fojo kun grandega bruvo subite disfalos, tiam vi, miopuloj, miros, kiel ĝi okazis, kiam ja hieraŭ ankoraŭ 99/100 de la murego staris netuŝita; tiam vi alkuros al ni, grandanime helpos al ni triumfi la venkon, kaj vi diros: „ni laboris”. Sed la historio tiam ne silentos, sed diferencigos inter la laborintoj kaj la atendintoj.

(el *Originala Verkaro*)

2. Kabe

La tradukoj de Kabe estas diafane klaraj kaj impresas tute kiel originaloj per sia senpena flueco. Li arte kaŝas la arton kaj nenie oni sentas la fortostreĉon sub la rezulta glato. Afiksojn li uzas pli ŝpare ol Zamenhof: tiuj specialoj (-aĵoj); festis du solenojn (-aĵojn); flamema (-iĝema); saturita de troo da vivo (troeco); la virinoj devas ĉiam trovi (troigi): vi ĉirkaŭas min per spionoj (ĉirkaŭigas). — Kelkfoje li uzas de l' anstataŭ de el motivo pli estetika ol semantika: krioj de l' gojo; sub la brilanta de l' steloj ĉielo. — Li ankaŭ kuraĝe aplikas la 14-an regulon de nia gramatiko: Ridu tion; koketi iun; vi komercas la virinojn; tirani iun; spioni lin; la mondo, kiun ni loĝas. Jen ĉerpo el lia ĉefverko La Faraono de Boleslaw Prus.

Post kelke da tagoj Ramzes estis alvokita al sia plej respektinda patrino Nikotris, kiu estis la dua edzino de l'faraono, sed nun la plej granda sinjorino en Egipto.

La dioj ne eraris, farante ŝin patrino de reĝo. Ŝi estis persono alta, sufiĉe dika kaj malgraŭ siaj kvardek jaroj, ankoraŭ bela. Precipe en la okuloj, vizaĝo kaj tuta aspekto ŝi havis tian majeston, ke eĉ kiam ŝi iris en simpla vesto de pastrino, ĉiuj klinis antaŭ ŝi la kapon.

La nobla sinjorino akceptis la filon en kabineto, ornamita per fajencaj kaheloj. Ŝi sidis sur inkrustita seĝo, sub palmo: Ĉe ŝiaj piedoj sur tabureto kuŝis malgranda hundo; ĉe la alia flanko genuis sklavino kun ventumilo. La reĝa edzino havis sur si muslinan mantelon, broditan per oro, kaj sur la peruko lotusforman ringon ornamitan per juveloj.

La princo profunde kliniĝis, la hundo ĉirkaŭflaris lin kaj ree kuŝiĝis. La reĝino delikate klinis la kapon kaj demandis:

— Kial vi petis aŭdiencon de mi?

— Jam antaŭ du tagoj, patrino...

— Mi scias, ke vi estis okupata. Sed hodiaŭ ni ambaŭ havas liberan tempon, kaj mi povas aŭskulti vin.

— Vi tiel parolas al mi, ke kvazaŭ vento de l' dezerto blovas sur min, kaj mi ne havas plu kuraĝon prezenti al vi mian peton.

— Kredeble pri mono?

Ramzes konfuzite mallevis la kapon.

— Kiom vi bezonas?

— Dekkvin talentojn...

— Ho dioj! — ekkriis la reĝino — antaŭ kelke da tagoj oni ja pagis al vi dek talentojn el la trezorejo. Promenu iom, mia knabino, en la ĝardeno — sin turnis la reĝino al la nigra sklavino, kaj kiam ili restis so-

laj, ŝi demandis la princon:

— Do via Hebreino estas tiel postulema? Ramzes ruĝiĝis, sed levis la kapon.

— Vi scias bone, patrino, ke ne — respondis li. — Sed mi promesis rekompencan al la armeo kaj... mi ne povas pagi!... La reĝino rigardis lin kun trankvila fiero.

— Malbone estas — diris ŝi post momento — se la filo faras decidojn ne petante konsilon de l'patrino. Memorante pri via aĝo, mi volis doni al vi fenician sklavinon, kiun sendis al mi Tiro, kun doto de dek talentoj. Sed vi preferis la Hebreinon.

— Ŝi ekplaĉis al mi. Tiel bela ne ekzistas inter viaj servistinoj, patrino, eĉ inter la virinoj de lia sankteco.

— Sed ŝi estas Hebreino!...

— Ne antaŭjuĝu, patrino, mi petegas vin... Estas malvero, ke la Hebreoj manĝas porkaĵon kaj mortigas la katojn...

La reĝino ekridetis.

— Vi parolas kiel lernanto en la plej malalta pastra lernejo — respondis ŝi, levante la ŝultrojn, — kaj vi forgesas pri tio, kion diris Ramzes Granda: „La flava popolo estas pli multnombra kaj riĉa ol ni; ni agu kontraŭ ĝi, sed singarde, por ke ĝi ne fariĝu ankoraŭ pli forta...“ Mi do ne pensas, ke knabino el tiu popolo estas konvena unua amatino de la kronprinco.

— Ĉu la vortoj de Ramzes povas esti aplikitaj al la filino de mizera terluanto?... — ekkriis la princo. — Cetere, kie estas

tiuj Hebreoj ĉe ni?... Antaŭ tri jarcentoj ili forlasis Egipton, kaj hodiaŭ ili formas ridindan ŝtaton, regatan de pastroj...

— Mi vidas — respondis la reĝino, — ke via amatino ne perdas tempon... Estu singarda, Ramzes!... Memoru, ke ilia estro, Messu, estas perfida pastro, kiun oni malbenas en niaj temploj ankoraŭ hodiaŭ... Memoru, ke Hebreoj forportis pli da trezoroj el Egipto, ol valoris la laboroj de kelke da iliaj generacioj: ili forportis ne nur nian oron, sed ankaŭ la kredon je la Sola kaj niajn sanktajn leĝojn, kiuj ili hodiaŭ proklamas siaj. Fine sciuj — aldonis ŝi kun forto — ke la filinoj de ĉi tiu popolo preferas morton ol la kuŝejon de fremdulo. Kaj se ili donas sin, eĉ al estroj de l'malamikoj, ili faras tion sendube por akiri ilin por sia politiko, aŭ por mortigi ilin.

— Kредu al mi, patrino, ke ĉiujn ĉi in-formojn disportas la pastroj. Ili ne volas allasi al la malsupro de l'trono homojn de alia kredo, kiuj povus servi la faraonon kontraŭ ili...

La monarĥino leviĝis de l'seĝo kaj, kru-cinte la manojn sur la brusto, mire rigar-dis la filon.

— Estas do vero, kion oni diris al mi, ke vi estas malamiko de l'pastroj! — Vi, ilia plej amata lernanto?...

— Verŝajne mi havas ankoraŭ signojn de iliaj bastonoj sur mia dorso!... — res-pondis la princo.

(el *La Faraono*, ĉapitro 7)

3. Edmond Privat

Laboris tre amplekse por kaj en Esperanto kaj verkis same vaste kiel historiisto de la lingvo, biografo de la Majstro ktp. en prozo, poezio, dramo. Lia stilo estas antaŭ ĉio konciza kaj eleganta. Per mallongaj frazoj kaj vortoj kun maksimume po unu afikso li celas priservi la plej modestan komprenkapablon. Tio fariĝas kelkafoje ne simpleco, sed simplismo. La jena teksto estus rekonebla kiel lia, eĉ se oni ne legis la koncernan verkon.

Tiu sama gusto je vivo kaj flekseblo retroviĝas ankaŭ en la stilo Zamenhofa. Li ne estis ĥemiisto, astronomo, matematikisto, aŭ eĉ nur lingvisto, teorie diskutanta ĉe komitato. Li estis verkisto. De l' frua

infaneco li montriĝis jam poeta. Arto lia estis la uzado de la vortoj. Harmonio kaj muzika sento ĝenerala lin inspiris por la lingvo kaj la stilo. Li hontis pri Esperanto ĝis tiam, kiam ĝi fluis tute dolĉe. Li ĝin

eldonis nur tiam, kiam li sukcesis libere verki poemojn en la lingvo. Kiam ĝi aperis, la fundamenta materialo estis malpli la gramatiko, ol la tekstoj kaj la stilo. La dek ses reguloj fakte nur tirigis el la lingvo jam uzata kaj provata dum longjaroj. Kiel ame li enblovis ĝian vivon kaj spiriton, tion oni povas ekkompreni per la frazo lia: „Konfidi al komitato krei lingvon, estus tiel sensece, kiel ekzemple konfidi al komitato verki bonan poemon”. (...)

La frazoj Zamenhofaj estas ofte longaj. Verkistoj pli modernaj havas malan guston. Sed la rakonto fluas vive kaj rapide.

Forto sentiĝas. Ĉe li, la ripetoj ŝajnas ne sistemaj. Ili pezas, kiel fruktoj de l'fervoro. Gente kutima je batoj kaj atakoj, li ŝirmis sin per argumentoj, kaj rebatis kontraŭdirojn jam antaŭe. Sed ĉiam ideo kontraŭ ideo, klarigo kontraŭ antaŭjuĝo, neniam homo kontraŭ homo. Tamen, eĉ tiu nepersona batalemo en skribado lin timigis. Ĝi ofendis lian noblan amemon kaj ŝajnis al li malhumila. Sur korektita manuskripto de Homaranismo, postmorte trovita, mi rimarkis krajone skribitan de lia mano tiun ĉi noton memorigan al si mem; „Eviti ĉion agresivan!”

el *Vivo de Zamenhof*

4. Jean Forge

Lia dinamika rakonta stilo respondas al lia mensa etoso de tekniko nuna kaj estonta, kun rapidaj eventoj kaj psikologio sufiĉa por animi la homfigurojn, sed ne tiel profunda, ke ĝi ĝenus la kuron de l' romano. Ĉi tiu ekstrakto bone ilustras, kiel adekvate lia stilo portas kaj peras la enhavon. Kiel filmreĝisoro li certe trafis sian metion.

Miaj piedoj plektiĝas en iu arbetojo. Mi falas teren. Sed mi daŭrigas mian kuraĉon. Mi flugas tra la mallumo... ŝajne en nigran abismon malsupren... branĉoj vipas mian vizagon... mi ne atentis ilin... for! Sed la tero sub mi estas glata kaj malseka. La koto gluiĝas al miaj plandoj... mi falas...

Nun mi ne plu levas min. Mia forto ne sufiĉas. Mia konscio volas forlasi min. Sed mi retenas ĝin perforte. Mia spiro elbuŝiĝas kiel vaporo. Mi tremegas frosto-febre.

Mi sidas sur gluema kaj malseka tero.

Sub mi etendiĝas iu palaĵo — la lago.

Apud mi staras arbetojoj. En la ĉielon kreskas nigraj grandeguloj — la poploj.

Mi sidas. Super mi ekmuĝas la poploj mallaŭte.

Mi sidas kaj streĉe rigardas. Ĉu ne iuj blankaj figuroj dancas ĉirkaŭ mi?... Brakoj etendiĝas... brustoj leviĝas avide...

kaj nudaj plektaĵoj de brakoj kaj kruroj serpentas...

Mi volas reiri. Pro kio mi forkuris? Ĉi ja pasie atendas... Mi volas leviĝi, rampi... sed mi refalas senforte.

Iom post iom gutoj falas. Sur la ĉielo migras grandegaj nuboj... kaj la poploj minacas gigante.

Pluvas... La pluvaj gutoj falas sur la foliojn, ruliĝas de ili malsupren kvazaŭ larmoj. Ili falas sur min... kaj miksiĝas kun miaj larmoj, kiuj malrapide, nehaltigeble ruliĝas sur miaj vangoj...

Mi ploras. Miaj larmoj fluas. Ili estas balzamo por mia vundo, kiun mi sentas en mia koro...

Mi malfideliĝis al vi, Zonjo! Mi forgesis vin...

La pento fariĝas pli kaj pli granda. Mi pekis kontraŭ Zonjo. Mi amis alian virinon, kiu forlogis min de mia hejmo. Mi perdis mian hejmon...
el *Abismoj*

5. Julio Baghy

Pura originalisto, kiel poeto kaj aŭtoro de noveloj, romanoj, dramoj. Li sorbis la humanan sentimenton de Zamenhof kaj ankaŭ lian stilon, kiun li aplikis kun riĉa tembro kaj aparta verbo. Lia poezio uzas neniujn licencojn kaj parolas per samaj moduloj, kiel lia prozo. Ĉi tiu estas varme spontana, tuŝante ĉiujn humorojn de tragiko, tenero, sentimentalismo, komiko kaj satiro sen malico. Jen ekzemplo de la lasta.

(La entuziasma kursgvidanto parolas senhalte...)

Mihok: Kaj nun ne forgesu ĉiam ekzerci la lingvon tiel, kiel vi faras tion dum miaj kursaj horoj, ĉar la seninterrompa ripetado de frazoj, esprimoj, memorfiksas la vortojn kaj instruas nin pri la ĝusta korekta uzado de tiuj ĉefaj elementoj de la lingvo, el kiuj formiĝas la ĉeno de la parolado, la perfekteco de la scio, flueco de la tuj komprenebla klara konversacio. Paroli kaj paroli kaj ĉiam paroli!

Jes, karaj tre estimataj gelernantoj miaj, homfratoj de mia koro en la brusto batanta kaj... kaj... gefiloj de mia batanta koro en la samideana brusto... brusto... Karaj gesamideanoj kaj gesamcelanoj... nu... ĉu vi komprenas?

Horo de la Gelernantoj: Jes!

Mihok (en sia plej alta ekstazo preskaŭ ŝvitante larmojn pro kortuŝiĝo): Jen, jen, jen! Tion mi atendis de vi. Se tiel bone vi progresas, tiam certe, nepre post tri monatoj vi ĉiuj mirinde bele povos paroli la lingvon Zamenhofan, la lingvon, kiun kreis la homaramo, kiu estas identa je „interna ideo” de nia vivanta Esperanto. Nur paroli kaj ekzerci kaj ekzerci kaj paroli kaj vi ĉiuj konstatos la sukcesplenan rezulton de miaj metodo, sistemo, instrumaniero, esperantiga edukado...

ĜIS, ĝis, ĝis, karaj miaj gelernantoj tre estimataj!

Horo de la Gelernantoj: Ĝis!

el *Praktika instrumento*
en „Migranta Plumo”.

6. E. Lanti

Fondinto kaj multjara gvidanto de Sennacieca Asocio Tutmonda, li alprenis la lingvon kiel laborilon, kiun li volis apliki trafe kaj racie. Lia devizo estis: „La verkisto devas peni por eviti penon al la leganto” tamen ne en tia grado, ke „li kastras sian penson”. Por Lanti la stilbelo estas nur akcesora produkto de efika esprimado. Li rigardis la sufikson -eco kiel balastan ĉe adjektivaj radikoj kaj preferis diri klare, simpla, anstataŭ klareco kaj simpleco. Poste li konstatis, ke ankaŭ Zamenhof iafoje rezignis pri -eco (kaj -aĵo) en siaj lastaj verkoj (verdire ankaŭ en la fruaj!): longo, alto, eblo, / organizo, konstruo. Centprocenta esperantisto, por li Esperanto estis lingvo hejma.

La kamentubo

Eminentaj filozofoj asertas, ke regas ordo en la Naturo. Povas esti. Sed por tion konstati, ili sendube metis sur sian nazon okulvitrojn, kiuj tute mankas al mi. Por miaj okuloj fakte estas videbla ĉie ĉirkaŭe

nur granda ĥaoso. En la kruda naturo ĉio rezultas de hazardo kaj de blindaj fortoj. Nur la homo kreas ordon en la mondo. Per lia genio kaj volo — jes volo — riveroj transpontigas, vojoj, domoj, ŝipoj, maŝinoj

konstruiĝas por difinita celo. La naturo fariĝas la servanto de l' Homo. Kie oni konstatas ordon, tie la homa laboro, la tekniko, la arto triumfas...

La ordo estas artefaritaĵo.

Tiajn pensojn mi cerbumis iun tagon en la Silezia montaro, kie mi ripozis dum kelka tempo post nia IX-a Kongreso. Ĉie en tiu bela regiono montoj kaj valoj kuŝas senorde, sencele. Verdaĵ arbaretoj kvazaŭ kapvestas la montojn laŭ plej diversa maniero. Treege fantazias la naturo.

El post verdaj abioj jen ĉi tie kaj tie aperas iu alta kamentubo. Ĝi certe malharmonias kun la medio; ĝi difektas la pejzaĝon, elĵetante nigran fumon en la bluan ĉielon. Poetoj kaj romantikaj turistoj certe tre malbenas la kamentubon.

Al mi ĝi ankaŭ aspektas malbele. Sed mia racio konsilis, ke mi aŭskultu la kla-

rigojn de la kamentubo. Kaj ĝi parolis jene:

„Dank' al mi vi povis rapide kaj relative malkare veni ĉi tien por admiri la pejzaĝon: la fervojo, kiu kondukis vin, ja ne povus ekzisti, sen mia helpo; dank' al mi la kamparano tie en la valo, sidanta sur rikoltmaŝino, plenumas sen granda peno taskon, kiu postulis antaŭe ŝviton kaj egan laciĝon de eble dek laboristoj; dank' al mi vi havas en la poŝo horloĝon, kiu ebligas al vi akuratan rendevuon kun tiu K-do, kiu promesis veni renkonte al vi el relative malproksima urbeto; dank' al mi tiu via K-do posedas biciklon, per kiu li veturas al vi; dank' al mi...”

Longe tiel parolis la kamentubo. Mi fine komprenis, ke eĉ dank' al ĝi Esperanto povas ekzisti kaj SAT funkcii.

el Vortoj de Kamarado E. Lanti

7. Georges Avril

Li skribis kun ia hejma simpleco ĉarmajn felietonojn de vilaĝa kaj urba vivo. Kun jurnalista okulo li trafas scenetojn, kiujn li peras al ni alloge kaj grafike. Li sprite eluzas la vortajn kaj vortfarajn rimedojn de la lingvo por esprimi ĉion necesan: novajn vortojn li ne bezonas. Li vartis kaj influis aliajn talentojn, interalie Jean Ribillard.

Najbaro mia posedas blankan katidon. Ĉu prave aŭ malprave, tio al li plaĉas.

Kelkaj legemaj samideanoj eble memoras, eble ne, ke la plej bela ornamo de mia hejma menaĝerio estas blonda kokino, kiu, iom vandale, sed absolute tirane, mastradas la tridek-sep kvadratajn metrojn de mia ĝardeneto. Ĉiuokaze tiel estas.

La krado, kiu ĉirkaŭbaras mian urban bieneton malhelpas, ke kokino — aŭ koko — el ĝi forkuru. La feraj stangoj staras tro proksime unuj de la aliaj, por ke matura kortbirdo pasu inter ilin, kaj estas tro altaj, por ke ilin ĝi transflugu. Sed tia

aranĝo neniel kapablas ĝeni subtilan anon de la kata raso, eĉ se tiu ĉi estas plenkreska virkato hardita en la spertoj de ŝtelado kaj paradas per oreloj glorie disŝiritaj en la rivalbataloj de dek amsezonoj. Des malpli, kompreneble, se temas pri kvarmonata katio sufiĉe maldika kaj fleksiĝema por senĝene enrampi en mustrueton. Do, kio devis okazi, tio okazis: unu matenon, blanka kaj glimbrila kiel neĝbulo sub la suno, per malrapidaj, singardaj, tamen facilaj movoj, la najbara kateto enŝteliĝis en mian ĝardenon.

el Blanka kato kaj kokino blonda, en Nia Gazeto.

8. Raymond Schwartz

Bardo, kiu al tri volumoj de kabaretaĵoj aldonis novelojn, artikolojn, mallongan romanon kaj fine unu romanon grandan. Lia humoro sin nutras ĉe la vivo kaj eĉ liaj fantazioj kaj hiperboloj radikigas en la realo. Li prefere esprimas sin konkrete kaj per palpeblaj metaforoj, kiel ilustras la jena mallonggranda specimeno.

Por paroli necesas malfermi la buŝon. Sed kiam oni malfermas la buŝon, ne estas ĉiam por ion diri. Oni povas malfermi la buŝon por manĝi, aŭ trinki, aŭ spiri plenpulme, aŭ por oscedi, aŭ esprimi miron, aŭ tute simple por... malfermi la buŝon, kiel ekzemple, ĉe la dentisto, kiam oni sidas sur la komforta torturseĝo. Tiurilate, ĉu mi rajtas rimarkigi, ke la dentistoj ĝenerale estas malbonaj pedagogoj? Por ko-

menci ili diras al vi: „Malfermu la buŝon!” kaj tiam ili tuj ŝovas inter viajn vangojn tutan aron da fremdaj aĵoj, vaton, pape-ron, kaŭĉukon, pinĉilojn, ŝraŭbojn, tenilojn kaj nun, kiam via buŝo estas ĝiseksplode plena kiel militpreta arsenalo, nun ili naive demandas: „En kiu dento vi sentas doloron?” al kio vi povas respondi nur per onomatopeaj ĝargarsonoj.

el Por nenion diri en „La ĝoja podio”.

9. M. Ljubin

Proleto, verkisto, novelisto, poeto, tradukisto kaj redaktoro. Facila lingvorego kun sprite simplaj parolturnoj. Interese, ke en 1931 li registras la ĝis nun solan uzon de 'konversi' por konversacii per la formo 'konversado': mallongigo, kiun la Akademio per blinda koincido aprobis nur en 1973. Li verkas kun pulsanta seriozo, kiu ampleksas tute nature la amikan bonhumoron de Kamarado Bojko, kies komencon mi donas, kaj kiu cetere finiĝas per alia tono.

Li estis nomata Bojko.

Ke li estis kamarado de bona kvalito — jen pri kio mi volas vin certigi, kvankam lia pensmaniero ne iris la vojon de ordinara, sana homo.

Li ofte havis fiksideojn.

Li ankaŭ estis bona esperantisto — nur la akuzativon li kelkfoje misuzis.

„Nur tiun ĉi vorton ne plaĉas al mi”, li diris.

La vorto, kiu malplaĉis al li, estis „disreviĝo”.

„Kial 'disreviĝo'?” ripetadis li. „Pli ĝusta estus 'malreviĝo!’”

Mi ĝojis, ke Bojko estas pensema esperantisto. Li volas perfektigi sin. Sed poste mi konstatis, ke ne estis tiel; tio estis lia fiksideo. Li entute kondutis strange. Por mi tiu punkto de lia pensado estis ĉiam

malklara. Dum la interparolo li kelkfoje denove revenis al la sama vorto. Evidente estis, ke ĝi tro okupis lian cerbon.

„Disreviĝon eĉ ne bonsonas,” li ripetis tute ne ĝustaloke, rompante la linion de la konversado. „Kaj jen en la vortaro ĝi sidas.”

Li ne trankviliĝis antaŭ ol montris al mi la vorton en ia malnova vortaro.

„Vere”, mi jesis, „vi pravas. Diru elreviĝo. Elreviĝu, tio signifas eliĝu el viaj revoj.”

Momente li ŝajnis esti kompreninta, sed poste ripetadis insiste: „Al mi ne plaĉas disreviĝon!”

Insistema homo. Ĉu eble io mankas al li?

(el „Kamarado Bojko” en „La himno”)

10. Francisko Szilágyi

Poeto kaj, pli amplekse, prozisto, kiu verkis fabelojn, felietonojn kaj tri novelarojn. La vivon li observas per simpatia okulo kaj sen rozvualaj iluzioj. Tragikon li registras klare kun kvieta potenco, sed pli ofte li sin turnas al la intimaj eventoj en la ĉiutaga vivo, kiel en ĉi tiu komenca parto de „Nila”. Lia lingvaĵo portas riĉan rikolton de semantikaj trovoj.

Nila estas bluokula, blondbukla knabineto, eta, gracia, plej ofte bonkonduta, kvarjara. Norda tipo, kvankam pli malalta ol la samaĝaj nordaj knabinoj. Ŝi estas serioza, gravmiena, aŭ turte ridanta, precize kiel la situacio postulas. Ŝi aperas ĉe ni plej ofte eleganta kiel eta princino, sed kelkfoje ŝi estas malpura, ĉar nia silenta interkonsento estas, ke inter ni ne ekzistas konvenciaj baroj. Kiel akrokula detektivo ŝi rimarkas ĉiun novan detalon en nia loĝejo kaj respondigas nin pri ĉiu ŝanĝo, kiu okazis inter ŝiaj du vizitoj. Kiam ŝi havas emon entrepreni la grim-

padon al nia alte situanta nesto, ŝi frapas sur la pordon, parte ĉar tion ŝi lernis antaŭ nelonge kaj sekve la ago ankoraŭ interesas ŝin, parte ĉar la pordo estas ofte ŝlosita kaj ŝi ne povus enveni.

Sed ŝi enmarŝas sen saluto. Per tio ŝi supozeble substrekas certan senceremoniecon: oni evitas per tio, ke la alia partio sentu sin instigita paradi per sia pli alta ago (kvankam tion la alia partio ververe ne emas fari), parte per tio ŝi povas demonstri, ke nin ŝi akceptas kiel egalulojn kaj pri tio mi estas efektive fiera.

(el Nila en „Koko krias jam!”)

11. Ivo Lapenna

Potenca oratoro kun senmanka elokvento, kies verkojn markas tiu sama voĉkvalito, kiu regas liajn paroladojn. Li do zorgas, ke la silaboj portu plene kaj klare la sencon kaj tial li prefere diras praveco, justeco, libereco, ktp. anstataŭ pravo, justo, libero. Necesas aldoni, ke por la aparta celo de Lapenna liaj rimedoj estas perfektaj. Al tio apartenas ankaŭ la ritmo de liaj frazoj, kiu dependas de ia regula, emfaza pulso. Tial li diras ĉiam „tiu ĉi” kaj neniam „ĉi tiu”, kaj metas la konjunkciojn „do” kaj „tamen” ofte ekster la plej kutiman lokon — ekzemple: „Tio ne influis, tamen, la rezulton”, „La neŭtraleco ne signifas, do, senideecon aŭ uniformigon de la penso”, anstataŭ (sen komoj) „Tio tamen ne influis...” kaj „La neŭtraleco do ne signifas...” Ambaŭ vortordoj estas kompreneble egale bonaj.

La jena specimeno venas de parolado farita en Sorbono dum la 35-a U.K.

Giganta estas tiu lukto inter la putriĝantaj restaĵoj de la pasinteco kaj la brilantaj perspektivoj de la estonteco, lukto, en kiu estas mobilizitaj ĉiuj fizikaj kaj moralaj fortoj, kaj kies atestantoj kaj partoprenantoj estas ankaŭ ni!

Malfacile kaj peze la universalismo traboras al si la vojon tra marĉoj, nebuloj kaj tempestoj, inter fajro kaj glacio, sub insidoj kaj obstakloj al la ore sunumitaj pintoj de ekonomia bonstato, al la lazuraj serenoj

de socia justeco kaj libereco! Sed nehaltigeble, venke ĝi marŝas antaŭen.

Estis Kant kiu diris, ke ekzistas postuloj de la racio kaj postuloj de la historio. Estu al mi permesite iom ŝanĝi la penson de Kant kaj diri: la universalismo estas postulo racia, ĉar ĝi estas postulo de la historia evoluo de la homaro, kiu — kondiĉite de la teknika progresado — iras de diverseco kaj pluraleco al konkordo kaj unueco. (...)

Ne estas hazardo, geamikoj, ke ĉiuj ti-

ranecaj kaj despotecaj reĝimoj levis sin kontraŭ Esperanto, malpermesis la lingvon, persekutis la esperantistojn! Se Esperanto estus infanludilo, se vere de ĝi oni ne povus interkompreniĝi, se ĝi havus nenian idean signifon, kredis al mi, ke ili grandskale propagandus ĝin. Sed ĉar la Internacia Lingvo havas grandegan spiritan forton, ĉar ĝi troviĝas ĉepinte de universalismo kaj tuthomeco, ĝi estis kaj estas atakata de ĉiaspecaj ŝovinistoj. Tiuj atakoj ne devas

nin timigi nek senkuraĝigi. Kontraŭe, ni fieru pri ili! Ni fieru, se tiraneco nin kontraŭstaras, ĉar tiraneco ĉiam kontraŭstaras noblecon kaj veran progreson. Tiuj atakoj konvinku nin ankoraŭ pli firme pri la praveco, vereco kaj grandeco de nia afero. Ni konsciu, ke la spirito estas nevenkebla krom se ĝi mem rezignas pri defendo kaj rezisto! La ideon oni povas nek enkateniĝi, nek aresti, nek mortigi!

el Retoriko

12. Reto Rossetti

Membro de tiu „Skota” skolo, mem heredinto de la „Budapeŝta”, talento multifaceta: aŭtoro de viglaj noveloj (El la Maniko), sentoplenta poeto (Kvaropo); malpli sukcesa humoristo (Profesoro Klapelkap, en la sama); kaj akradenta recenzisto. En la ĉi-suba, neaperinta, recenzo pri verko de Brendon Clark, evidentiĝas, sub formo de malpeza, tamen morda, ironio, lia mal-kaŝa (prava?) severo, sed ankaŭ tio, kio karakterizas lia’n aliajn ĝenrojn: riĉo kaj viveco de la lingvo, uzanta sen perforto, sed funde la latinto de nia ankoraŭ prilaborinda idiomo. El lia verkaro, ĉefe la noveloj els aras

R. ger Bernard

„Kien la poezio” de Brendon Clark

En ĉiu sana literaturo aperas, kiel normala fenomeno, verkoj korpe kuriozaj. Ni ne bezonas pli laŭtan pruvon pri la bonfarto de nia literaturo, ol la apero de „Kien la poezio”. Jen verko tiel eminente malbona, tiel energie lama, ke nur sanega literaturo povus ĝin produkti.

Estas vere nefacile, atingi en unu verko tiom da brile kontrastaj kvalitoj, kiom troviĝas en ĉi tiu traktato. Al mi ŝajnas, ke neniam mi legis en Esperanto libron tiel pozitive nulan, tiel robuste malfortan kaj riĉe mizeran. En kiras masive ajura Brendon Clark eliras sur la batalkampon, svingante timindan glavon el gutaperko kaj pafante kuglojn el malseka pasto. Mi, ortodoksa kulturanto de nia poezio, neniam antaŭe sentis min tiel solide batita, ol per la vatkusenoj de tiu brava hidalgo. Salutatu Brendon Clark!

Mi ne diras, ke en la ideoj elmetitaj

troviĝas nenio bona. Neniu verko povus esti tiom fervore dispafa sen kelka trafo. Eĉ blinda kokino foje trovas greneron. Sed por juste trakti la grajnon da bono kaj la buŝelon da ventumaĵo necesas havi la paciencon de Kalocsay. Kaj tiun paciencon mi ne havas.

Mi povas nur diri, ke mi estas entuziasma pri tiu libro kaj mi volas vaste rekomendi ĝin. Ĝi legiĝas facile kaj enhavas multajn gajajn momentojn. Mi sentas, ke neniu, kiu kore interesiĝas pri nia poezio, volonte malhavas ĉi tiun bravuran verkon. Agrabla estas ĝia aspekto: ĝi estas klare presita kaj tiel fortike bindita, ke verŝajne ĝi bone eltenus, se oni kelkfoje ĵetus ĝin tra la ĉambro.

La aŭtoro, malfeliĉe mortinta antaŭ pli ol unu jaro, postlasis ĉi tion kiel sian testamenton. Ripozu lia cindro!

R. Rossetti

13. Luis Hernández

Redaktis la gazeton *Popola Fronto* dum la hispana interna milito. Li verkas kun oratora patoso, ĉe kiu la kontrolo intelekto jen bridas, jen el-lasas la pasion des pli efekte. Tia kunfando de konstato kaj ardo naskas kvazaŭ spontane esprimojn ĉiam trafajn kaj neniam banalajn. Lia ritmo kaj sonsekvo estas senmanke voĉotaŭgaj. Liaj pli longaj artikoloj kelkfoje plusas per egale spirlongaj esprimoj, kvazaŭ li pensus per „ĉeneroj” kun jen aldono, jen plia, jen plua, ĝis fino de la ŝnuro, nome de la frazo! Tio, kaj lia tendenco jungi adverbbon al verbo kun preskaŭ egalaj valoroj (manovre trompi, treme paniki, kie oni egale bone povus diri manovri trompe, tremi panike) faras lian stilon burleskebla, sed tion fari estus frivole antaŭ lia rekta sincero. Jen la komenco de lia debuta artikolo, kaj de la dua.

(a) Linio de fajro dividas abrupte, je du partoj ekstremaj, la amplekson de nia lando. Dum bleke parolas kanonoj, vomante detruon kaj morton, laŭ senkompata konkuro inter libero kaj abomeno, nenio honesta, nenio pura povas resti neŭtrala antaŭ tiel kruda dilemo.

Esperanto, nia lingvo bela, instrumento genia por homa progreso, ne povas ne helpi la vicojn popolajn per la forto morala de sia signifo aŭ per la efiko praktika de sia tutmonda retaro.

Tial do ni, proletaj esperantistoj, idoj de sana popolo, post ne tro longa medito, decidis, kun juna humoro, mobilizi ankaŭ nian lingvon, kiel voĉon de alta idealo, por diskonigi, en samideanaj rondoj, la helajn konturojn de nia lukto, la firmajn trajtojn de aroga epopeo verkita per la sango, ŝaŭmanta pro nobla kolero, de tuta la lando hispana.

el *Popola Fronto* I, 1. 1Nov., 1936.

(b) La subita. apero de nia bulteno, sur la brila horizonto de nia mondeto esperantista, ricevis nature familian saluton ĉe la proleta etaĝo, sed por ni estas tre interese konstati, ke la nasko ankaŭ ĝuis rapide kortuŝan akcepton, kvazaŭ kruĉon de freŝa pura akvo por soifanto, flanke de tiu granda amaso anonima de la esperantismo, kiu fervore honeste kaj sindoneme vivas kaj laboras, senĉese uzante nian lingvon kun fidela rememoro por ties aŭtoro kaj gardante samtempe, en funda angulo de sia brusto, la spiritan trezoron de pia respekto por la tiom larĝe diskutita interna ideo.

Tiu liberala kaj progresema samideanaro estas ja vere la aŭtentika plimultego de nia movado!

el *Popola Fronto* I, 2. 15 Nov., 1936.

14. Jean Ribillard

Li spiras ian senĝenan elokventon, kiu tuŝas tolere la homajn malfortojn kaj katenas la legantojn per facila sorĉo. Lia stilo varias inter agrabla babilo kaj blago, ĝis diboĉa bonhumoro, en kiu li petolas volupte per la esprimrimedoj de la lingvo. Liaj verkoj estas „Vagado sub palmoj” kaj „La vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud” (filozofiema azeno). Ni donas la enkondukon al la unua.

Antaŭ foriro

Vi okazeble suferas pro marmalsano, sunfrapo, rendoloro aŭ fuŝkuirajo, kiam vi foren vojaĝas. Tial komforte sidanta kun taso da teo ĉemane, kaj en la buŝo taŭge plenŝtopita pipo, vi preferas imagi agrablajn ekskursadon en nekonata regiono. Laŭ komplezema fantazio vi elektas pitorreskan landon, kie vi vagadas sen laciĝo, sen kontraŭajo. Vi vin ne embarasas per valizo, promenas kien vi decidis, haltas kiam vi bezonas, gustumas kion vi ŝatas. Kaj se hazarde al vi ne plaĉas la pejzaĝo, tro longa vi juĝas la vojon aŭ enuigaj la kunvojaĝantojn, vi tuj ĉesigas la veturiradon, galope hejmen revenas kaj retrovas malvarma vian teon kaj senfajra vian pipon. Ne grava estas la domaĝo.

Mi proponas, ke mi tiamaniere konduku

vin tra la Okcidenta Saharo.

Ni kune vizitos kelkajn oazojn, verdire iom rapide: sed promenante laŭlonge de la sablodunoj, ni ie kaj ie paŭzos por konigi kun Sinjoro Mohamed kaj Sinjorino Jamina, surprize rigardi pikan scenon aŭ ŝtele aŭskulti malicetan klaĉon.

Cetere vi povos salti de iu oazo al alia, ne sekvante la gvidiston, aŭ preterpasi banalan spektaklon, aŭ ripozi antaŭ kvietiga vidaĵo. Eĉ simple forlasi la tedan babilemulon kaj reŝanĝi vian pipon.

Sidiĝu, mi petas. La gvidonto deziras komence prezenti la landon, kien ni veturos, kaj unu bonan amikon, kiun ni ofte renkontos.

Jen li tuj levos la kurtenon...

el Vagado sub palmoj

15. V. Varankin

Aŭtoro de „Metropoliteno; sociala romano, kiu majstre interplektas du ŝajne apartajn rakontojn, kaj de la studo „Teorio de Esperanto“, Varankin estas unu el la grava grupo de rusaj verkistoj (aliaj estis E. Drezen kaj N. Nekrasov), kiuj alportis al la lingvo utilan slavan influon por korekti la tendencon de okcident-eŭropaj aŭtoroj. La rusan stilon markas (a) nenia okupiĝo pri stilo, sed nur la celo uzi trafe kaj plene la lingvon; (b) sintakso kelkfoje nekutima, kiu agrable kunfandas ritmon kaj logikon, kaj (c) surpriza esprimsimplo, ekzemple 'loksidaj' gentoj (kompare je nomadoj); la kulturaj 'ebloj' de iu loko (fizikaj provizoj) 'baziĝi' en nova loĝloko (sin aranĝi ktp), kaj (ĉ) la ilumina uzo-neuzo de la artikolo anstataŭ la okcidenta aŭtomata (kaj iufoje nelogika) apliko de ĝi. Ĉe Varankin ni trovas la konversacian parolturnon 'kaj tiel plu' tie, kie la parolanto ne finas sian penson. En Esperanto ĝi sonas amuze kaj nature, dum en anglaj dramtradukoj el Ĉeĥov tiu esprimo ĉiam sonas tradukite. Hodiaŭ tre mankas en nia lingvo la saniga rusa influo. En jena ĉerpo la uzo de 'ravas' anstataŭ raviĝas (lasta alineo) estas kuriozaĵo de Varankin.

— Paĉjo venis, paĉjo!

Orhara knabineto kuregas renkonte al Vitalij kaj, dum li formetas la suprajn vestojn, ŝi kroĉeme, kiel kato, grimpas sur liajn krurojn. Post unu sekundo ŝi jam si-

das sur lia ŝultro. Ŝiaj okuletoj triumfe briletas kaj diketaĵoj lipetoj esprimas la plej altan gradon de ĝuo.

— Paĉjo, sed ĉu vi scias, kion mi havas?

— misteraspekte flustras ŝi al li: en la

orelon, ruze okulsignante al la patrino. Olga staras apud trogo kaj, ne rigardante al Vitalij, lavas tolaĵojn, kun severe kunpremitaj lipoj. Ŝiaj brakoj ĝis la kubutoj ege ruĝiĝis kaj estas kovritaj de la sapa ŝaŭmo, kvazaŭ de neĝaj flokoj. Vitalij ĵetas sur ŝin rapidan rigardon.

— Kion do vi havas, filineto? — diras li kareseme subtenante la knabineton per la mano, por ke ŝi ne falu de la ŝultro.

— He, paĉjo! Vi estas tute malkonjektema! Ni havas katidon! Belan katidon! Ŝia buŝeto ŝmacetas kaj tuta vizaĝeto disfluas en feliĉa rideto.

— He, paĉjo, vere mi diras, be-elan! — ripetas ŝi.

— Ĉu paĉjo bela? — ridetante demandas Vitalij.

— Ne, la katido estas bela!... Kaj vi, paĉjo, ankaŭ estas bela, nur haroza!

La filineto alpremas sian vangon al vango de Vitalij ĉirkaŭprenas lian kolon kaj kisas sur la nazon.

— Nur sola nazeto ĉe la paĉjo ne pikas per la haroj! Ĉio cetera pikas. Kvazaŭ erinaco, kiu loĝas en zoologia ĝardeno! Razu vin, paĉjo, tuj razu! Mi estos vin rigardanta!

— Atendu, filineto! Komence ni tagmanĝu, kaj poste razu nin!

Olga, dirante nek unu vorton, viŝas la brakojn kaj iras la kuirejon.

— Ah! — ekkrias Injo. — Kial do vi, paĉjo, min distras per viaj parolaĉoj?

Injo same rapide forglitas sur la plankon, kiel surglitis antaŭe supren kaj senkomplete kaptinte je la ventro etan ilan

katidon, skuas ĝin super la kapo.

— Jen kia katido! Ĉu vi scias, kiel oni nomas ĝin?

— Vi mallevu ĝin sur la plankon! — diras Vitalij, kunsenteme rigardante la baraktantan en la aero katidon.

— Ne, atendu, paĉjo, ĉu vi scias, kiel oni nomas ĝin?

— Mi scias, certe mi scias! Vi nur mallevu ĝin kaj tuj mi diros!

Sur la vizaĝo de la knabineto aperas esprimo de sincera mirego. Kiamaniere la paĉjo povis konjekti? Sed tuj tiu ĉi mieno ŝanĝiĝas per ruza rideto. Ŝi zorge mallevas la katidon planken.

— Vi ne scias, paĉjo, certe vi ne scias!

— Ne, mi scias!

— Ĉu vi opinias, ke oni nomas ĝin Bazilo? — La okuletoj de Injo malice ridas.

— Kial li estas ruĝa — penas eviti rektan respondon Vitalij, tenante la katidon sur la manplato.

— Atendu, paĉjo, vi diru, ĉu oni nomas ĝin Bazilo?

— Nu, certe, Bazilo!

La knabineto laŭte ridas.

— Vi, paĉjo, tute estas malsaga! Ĝin tute oni ne nomas Bazilo! Ĝin oni nomas...

— Ŝi faras tre seriozan mienon kaj parolas grave: — Ĝin oni nomas Belul' Diafana! Jes, jes, jes! Belul' Diafana!

— Ho, kia belega nomo! — ravas Vitalij. Injo estas flatita. Ŝi ŝatas, kiam oni laŭdas eipensitajn de ŝi novajn vortojn.

el „Metropoliteno”

16. Ivo Rotkvić

Ivo Rotkvić estas la plej baroke bunta stilisto en la tuta lingvo. Eĉ kiam li ne tre scias kion diri, li nepre scias kiel diri ĝin. Ĉion li vidas sentas per bildoj, kiuj venas al li en tumulta, spontana vico, kaj ilin li esprimas per originalaj vort-kunmetoj arte tornitaj kaj plej gracie ondantaj. La lingvon li frandas kiel neniu alia, uzas ĝin volupte, kaj eĉ la skribo de simpla letero tuj malfermas la kluzon de liaj torentaj bild-figuroj. Kaj se iufoje la metaforoj karambolas — kiel ĉi sube, parolante pri Szilágyi apud la gigantoj Baghy kaj Kalocsay, li diras „estis malfacile gajni la spronojn de originala verkisto sub la platiga ombro de la du majstroj” — tio estas nur flankaj konsekvenceto de lia abundo. Se oni legus, sen aŭtorismo, lian antaŭparolon al „33 rakontoj” aŭ lian recenzon pri „Koko krias jam!” de Szilágyi (kies komencon ni donas), oni povas tuj ekkrii: „Jen

Rotkvić! — sed pri kiu verko li propre parolas? Kaj ĉu li efektive ĝin legis antaŭ ol diskursi tiel elokvente?" Kalumnio? Ne, mi diras — bagatelo! Oni lasu sin luli kaj ruli en la tajdo de lia esprimfebro, ĉar vere li estas unika: li superribijardas Ribillard (ant' ol Ribillard debutis kaj ankoraŭ post lia forpaso).

Kiam mi atentigis lin, ke (vd. alineo 2 sube) li konfuzis 'cizeli' kun 'ĉizi', li respondis: „Mi kapitulace levas la manojn antaŭ via rimarkigo 'juvelon oni eble ĉizas, sed neniel cizelas'. Nu tiaj misaĵoj facile okazas, se juvelon traktas krudfuŝaj manoj, kiel la miaj!" Ne, kara Rotkvić: 'cizelas' ja sonas tiel bele!

En ĵusa letero li mem skribis pri si ilumine:

— Cetere, kiam oni originale verkas (ne gravas pri kio) oni ĉiam defias la lingvon, esploras kemian konsiston de la vortoj kaj ilian spektron en bildoj, se oni celas en la leganto ekbruligi intereson kaj meditemon.

Nu komence kaj fine, Rotkvić estas, kiel la alia Ivo lia samlandano, verkisto-oratoro, kaj kiel tiu, li verkas kiel li parolas, tiel, ke en ĉiu skribo lia oni aŭdas la ritmon kaj tembron de lia voĉo. Ĉe li, ĉefa impulso estas la estetiko, dum ĉe Lapenna ĝi estas la intelekto. La ĉefverko de Ivo Rotkvić estas lia granda romantraduko „Cezaro" de Jeluŝiĉ.

Ferenc Szilágyi elformiĝis sur la Budapeŝta Parnaso kulerante mirindan lingvan nektaron el la sorĉista kaldrono de alĥemiistoj Baghy kaj Kalocsay. Sendube estis feliĉo sorbsuĉi tiun aroman lingvan eliksiron, sed estis malfacile gajni la spronojn de originala verkisto sub la platiga ombro de la du majstroj. Tamen la riĉa talento kaj profunda persona kulturo de Szilágyi elbatalis por li la lumrondon inter niaj ĉepintaj literaturistoj. Hodiaŭ estas jam akre elkonturita lia verkista profilo kaj preskaŭ elmezuritaj liaj literaturaj atingoj.

La nova libro, kvazaŭ multkolora ventumilo en la dis-ripa aranĝo, prezentas novelojn kaj skizojn, kiuj, kvankam ofte pezkarataj, tamen ne aldonas multajn novajn trajtojn al la fizionomio de prozisto Szilágyi. Ankaŭ ĉi tie li estas glitparola kaj orekatena rakontanto kun nur pinĉprenoj da priskribaj detaloj, tre lerte dismetitaj tra la pritema mozaiko. Liaj frazoj svarmas en vigla ritmo, iliaj tuberoj estas

skrupule forfajlitaj, sub brillakaj skvamoj de sonoraj vortoj insidas originalaj pripensoj. Kun majstra trafcerto Szilágyi elŝeligas el la vortokrusto ĝian sencan juvelon, elcizelante tiel unu el la plej rafinitaj stiloj. Ofte li elrivalas la nivelon de la klasika stil-travideblo de Waringhien. Sed lian frazon ne trasangas homecaj emocioj de Baghy, en ili ne torentas malbrid-ebla vervo, kiel tiu el la turba viglo de Rossetti.

Ĉe Szilágyi ĉio estas perfekte balancita, la vorto, la ritmo, la penso. Lia reliefo ne rifuĝas en profundajn entranĉojn, li evitemas la erupciojn de paroksismo elene, sur la vortojn li selas obtuzigan sordinon kaj eĉ tra apokalipsaj tumultoj li nur trapantoflas molpaŝe. Szilágyi ne permesas al la pasio kuntreni lin sur la ondokreston de eventoj, li preferas lumturan ĉambreton por observi kaj prinoti la uraganon, ne esplorante ĝiajn meteorologiajn kaŭzojn.

El recenzo pri 'Koko krias jam!'